Projet de réorganisation (suite), déposé par François Lo Jacomo

La réorganisation de Grésillon n'est pas terminée. Certes, les choses ont progressé depuis cette période difficile qui nous a conduit, en 2010, à renouveler l'ensemble du Conseil d'Administration. Nous avons amélioré l'ambiance de travail, redressé les finances en développant la communication, régularisé juridiquement et fiscalement la Société, changé les statuts dans le sens de l'ouverture, pour permettre notamment la location du château à des non sociétaires, entrepris des travaux indispensables (chauffage, assainissement…), enrichi notre programme… Mais il reste beaucoup à faire ! en particulier :

Poursuivre la régularisation juridique

Ce n'est pas terminé ! Nous devons notamment mettre à jour notre registre des sociétaires et choisir entre d'une part l'option « société civile » actuelle, avec ses contraintes (gérant, convocation par lettre recommandée…) et ses risques pour chacun des sociétaires, d'autre part l'option « société commerciale ». Une nouvelle modification des statuts doit être envisagée.

Moderniser notre méthode de travail

Efforçons-nous de mieux définir les responsabilités et de bien les distribuer entre les administrateurs et les autres actifs, tout en perfectionnant nos moyens de communication : il est possible, par exemple, d'utiliser plus efficacement internet pour le suivi des actions.

Continuer les travaux de rénovation

La priorité actuelle est de construire l'escalier extérieur permettant d'utiliser des chambres du deuxième étage, et de trouver de nouvelles sources de financement pour les travaux futurs.

Encourager les initiatives

Le regain d'enthousiasme a permis l'émergence de véritables projets, que ce soit l'école de théâtre « Demain le Printemps », l'association d'éducation populaire généralisée proposée par Claude Bensimon, ou le projet plus global de Pierre Soubourou et Elizabeth Dubot : leur présence à l'année permettrait de valoriser le château et le parc et d'y accueillir davantage d'événements.

Voilà un vaste programme pour une petite équipe : notre principal besoin est de trouver davantage d'actifs, et pas seulement des administrateurs. Nous devons également repenser la place du bénévolat, car pour certaines tâches, notamment la cuisine et les travaux de rénovation, nous sommes dès aujourd'hui obligés de faire appel à des professionnels, alors que nos finances ne permettent pas de salarier tous ceux qui travaillent pour Grésillon. Les week-ends bricolage ont repris un bon rythme, vous y êtes cordialement invités !

Projekto pri reorganizo (sekvo), deponita de François Lo Jacomo

Ne finiĝis la reorganizo de Greziljono. Ja progresis la afero depost la malfacila periodo, kiu necesigis, en 2010, renovigon de la tuta Komitato. Ni plibonigis la kunlaboran etoson, renormaligis la financan situacion dank'al pli vasta komunikado, reguligis la Societon jure kaj imposte, ŝanĝis la statuton cele al malfermo, interalie por ebligi la ludonon de la kastelo al ne-societanoj, entreprenis necesajn laborkonstruojn (hejtado, salubrigo…), pliriĉigis nian programon… Sed restas multo farinda! interalie:

Pluigi la juran reguligon

Ankoraŭ ne finiĝis! Ni devas krome ĝisdatigi nian registron de societanoj kaj elekti inter unuflanke la nuna statuso « civila societo » kun ties trudaĵoj (mastro anstataŭ komitato, kunvokado per registritaj leteroj…) kaj ties risko por ĉiu unuopa societano, aliflanke la statuso « komerca societo ». Ni devas plani novan statutŝanĝon.

Modernigi nian labormetodon

Ni strebu pli bone difini la respondecojn kaj taŭge dispartigi ilin inter la administrantoj kaj la aliaj aktivuloj, samtempe perfektigante niajn komunikilojn: eblas, ekzemple, pli efike uzi la reton por konstante scii pri la diversaj agadoj.

Daŭrigi la renovigajn konstrulaborojn

La nuna prioritato estas konstrui eksteran ŝtuparon, kiu rajtigu uzadon de kelkaj ĉambroj en la dua etaĝo, kaj trovi novan financadon por estontaj konstrulaboroj.

Kuraĝigi la iniciatojn

Pro revigliĝo de la entuziasmo aperis veraj projektoj, ĉu la teatra altlernejo de « Morgaŭ la Printempo », ĉu la asocio pri ĝeneraligita popola edukado de Claude Bensimon, ĉu la pli larĝa projekto de Pierre Soubourou (Ŝtonĉjo) et Elizabeth Dubot (Libnjo): ili intencas valorigi la kastelon kaj la parkon estante surloke tutan jaron kaj akceptante tie pli da eventoj.

Jen vasta programo por malgranda teamo: nia ĉefa bezono estas trovi pli da aktivuloj, kaj ne nur administrantoj. Ni krome devas repripensi la rolon de volontuloj, ĉar por kelkaj taskoj, interalie kuirado kaj konstrulaboroj, ni jam nun estas devigataj peti profesiulojn, kvankam niaj rimedoj ne ebligas salajri ĉiujn, kiuj laboras por Greziljono. La semajfinoj por laboremaj volontuloj refunkcias kun bona ofteco, vi ĉiuj estas kore invitataj partopreni ilin!